Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2017

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2017 okazis entute 12 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj neniu estrara kunveno, kvankam la estraro tamen komunikis.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 4 kaj 8 membroj, meznombre 5,1 (la mezaj nombroj por la jaroj 2006–2016 estis respektive: iom malpli ol 7; inter 6 kaj 7; 6,6; 6,5; 7,1; 6,9; 6,9; 7,4; 6,8; 6,6; kaj 6,4 en 2016). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post (parte eĉ dum) la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo *Næring og samfunn*, tamen dum la aŭtuno partoprenis maltro da membroj por tia subvencio. Temoj en 2017 estis:

– 30.1.: *Plani la printempan programon. Baki kaj manĝi panetojn*. Herman Ranes superrigardis la bakadon.
– 13.3.: *Ĉiuj parolu pri io.*
– 27.3.: *Ĉiuj parolu pri io.*
– 24.4.: *La komuna eŭropa referenckadro por lingvoj, aŭ: Kiel mezuri lingvosciojn?* Kjell Heggvold Ullestad prelegis.
– 8.5.: *Provlegado de Pondus-bildstrioj*. Judith Parelie Abrahamsen preparis.
– 12.6.: *Ferio en Rumanio*. Ulf Stenhaug montris bildojn kaj rakontis.
– 18.9.: *Plani la aŭtunan programon. Ĉiuj parolas po 5 min. pri sia somero.*
– 9.10.: *La Universala Kongreso en Seulo*. Herman Ranes rakontis pri la vojaĝo kaj montris bildojn.
– 16.10.: *Ni tradukas Pondus-bildstriojn*. Judith Parelie Abrahamsen preparis.
– 30.10.: *Ĉiuj parolas pri io.*
– 13.11.: *Ĉiuj parolu pri io*.
– 27.11.: *Ni tradukas Pondus-bildstriojn*. Judith Parelie Abrahamsen preparis.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2017, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj pri GET en la gazetaro.

Membrostatistiko

Fine de 2017 GET havis 13 membrojn (por la jaroj 2006–2016 la nombroj estis respektive: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, 15, 16, kaj 16 en 2016).

Partopreno en naciaj aranĝoj

Unu GET-ano partoprenis la Landan Kongreson de NEL en Sandnes en junio: Herman Ranes.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Unu GET-ano partoprenis la Universalan Kongreson en Seulo: Herman Ranes.

Vortara laboro

Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Ne estis aktiveco dum 2017.

Interreta aktivado
GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 19 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2016 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, 22, 20, kaj 19 en 2016). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2017 sendiĝis 66 mesaĝoj per la listo (por la jaroj 2012–2016 respektive: 68, 96, 45, 56, 38).

Biblioteko kaj aliaj libroj
La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes. Oni ne registris pruntedonojn en 2017.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007. Dum la jaroj, libroj el tiu valizo disdonaciĝis kiel premioj dum la Zamenhofaj festoj, kie kutime okazas lotumado. En 2016 Arne Olav Mjøen transdonis eĉ plian skatolon da libroj origine de la eldonejo. Ankaŭ tiuj estas vendeblaj kaj ne bibliotekaj.

Arĥivo
La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj
Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2017.

Ekstera mono
Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2017 Norsk Tipping pagis al la klubo 2343 kronojn (2373,50 en 2016). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet næring og samfunn*, kiu dum 2017 pagis al la klubo 1000 kronojn (1000 ankaŭ en 2016).

Postenoj

Estraro dum 2017, elektita de la Jarkunveno la 27an de februaro 2017
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 27an de februaro 2017
Revizoro: Bergny Dahl (nova)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2017
Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

Estraraj postenoj de klubanoj en NEL en 2017
Vicprezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Sekretario de NEL: Ulf Chr. Lunde
Estrarano de NEL (ĝis la Landa Kunveno): Herman Ranes
Revizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Vicrevizoro de NEL: Jørgen Åldstedt

Estraranoj de Legaco Uhlen (ĝis la Landa Kunveno): Torstein Kvakland (prez.), Ulf Stenhaug
Anstataŭanto en Legaco Uhlen (ĝis la Landa Kunveno): Judith Parelie Abrahamsen
Estrarano kaj prezidanto de Legaco Uhlen (post la Landa Kunveno): Herman Ranes
Estrarano de Legaco Uhlen (post la Landa Kunveno): Judith Parelie Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2017
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad
Revizoro de NJE: Ulf Stenhaug

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2017
Membro de la elekta komisiono de NEL (post la Landa Kunveno): Herman Ranes
Domkomisionano por NEL (ĝis la Landa Kunveno): Torstein Kvakland
Anstataŭanto por NEL en la Domkomisiono: Herman Ranes
Komisionanoj pri novaj laborplano kaj strategia plano de NEL (ĝis la Landa Kunveno): Torstein Kvakland kaj Judith Parelie Abrahamsen
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Chr. Lunde (komputiko, loĝas en Os) kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 19an de februaro 2018.